40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro 5

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

*** Ĵaŭdo *  2004.07.15**

**HODIAŬ**

### Ĵaŭde , la 15an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**09:00-10:00** Historio de la litova lingvo (P.Čeliauskas, en 204)
**09:00-12:45** Diplomiga seminario de IEI. Gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (salono de urba magistrato)
**09:30-11:00** Paroligaj kaj perfektigaj kursoj (E. Bondar en 200, S.Trenner en 305, N.Pietuchowska en 306)
**10:30-12:00** Seminario pri problemoj de la Esperanto-movado. Gvidas la prezidanto de Litova E-Asocio Povilas Jegorovas (en 204)
**11:00-12:00** BEF: Prelego de A.Korĵenkov "Anton Ĉeĥov en Esperanto" (en la salono de la magistrato)
**12:00-13:00** BEF: Literatura kvizo. Gvidas Halina Gorecka (en salono de magistrato)
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**14:00-15:00** Prelego de Nora Caragea "Mondfama libro, sed nekonata aŭtoro – personeco de Heinrich Hoffmann (en 204)
**15:30-16:30** Prelego de Jazeps Šlars "Renesanco de stenografio en Latvio" (en 204)
**15:30-17:30** Diplomiga seminario de IEI. Gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (en salono de urba magistrato)
**17:00-18:00** Videofilmo "Baltmara sukceno" (en 204)
**18:00-19:00** VESPERMANĜO
**19:00-20:00** Instruado de E-kantoj. Gvidas Vida Čojienė (en 204)
**20:00-21:00** Latva vespero (en kulturcentro)
**21:00-22:00** Konkurso-kvizo pri historio de Esperanto (en 204)

### KONKURSO-KVIZO PRI HISTORIO DE ESPERANTO

Post latva vespero rapidu en salonon 204, kie polaj samideanoj el Bjalistoko, naskiĝurbo de L. Zamenhof, organizas interesan konkurson. Ĝuste respondinte la demandojn, vi ricevos donacetojn. Komenco je la 21a horo.

### DU FOTO-EKSPOZICIOJ

En la vestiblo de salono 204 vi povas spekti ekspoziciojn de du polaj fotistoj.

Ekspozicio de Ilona EJSMONT, pola esperantistino el urbo Lodz, konsistas el du fotokolektoj: la unua, titolita "Ie malproksime", montras pejzaĝojn kaj naturon de Aŭstralio; La dua, sub titolo "Rigardo", estas parto de pli granda kolekto nomita "Lodz multkultura" kaj ĝi respegulas arkitekturajn monumentojn de malnova kaj nova urbopartoj de Lodz. Ĉe la ekspozicio eblas ricevi informojn pri la fotistino kaj ŝia krea vojo.

Alia ekspozicio estas fotoj de Andrzej SOCHACKI el Staszow. Ĝi konsistas el la du partoj: 1) Impresoj kaj 2) Esperanto-aranĝoj. Sur ĉ. 250 fotoj estas fiksitaj momentoj de E-aranĝoj, okazintaj de 1987 ĝis 2004. Krome estas prezentitaj historiaj konstruaĵoj de Pollando.

### INTERNACIA VESPERO

Se vi intencas prezenti programeron en bunta progrtamo de internacia vespero. Bonovu skribi vian nomon, kion vi prezentos, kaj donu informojn al Aida. Klopodu kiel eble plej vaste prezenti vian landon kaj montri al eksteresperantista publiko, ke nia lingvo ligas homojn kaj kulturojn.



▲ Enŝipiĝo por ekskursi al Rumšiškės.



▲ Fiŝo ĵus kaptita de la ekskursa ŝipo. Ja la rivero tiel abundas je fiŝoj...



▲ Interesa hundobudo. La du oreloj malhelpas hundon forkuri el la budo.



▲ Vizito al la muzeo



▲ Ekskurso en viglo, sed hejmenreveno en dormo.

## JAM PRI BET-41

Stafeton de BEToj transprenas Latvio kaj latvaj esperantistoj jam preparis informilon n-ro 1.

Dume estas fiksita nur la dato: BET-41 okazos de la 15a ĝis la 21a de julio 2005, do antaŭ la Universala Kongreso en Vilno. Temo de la aranĝo: BALTIAJ LANDOJ EN EŬROPA UNIO.

**Aliĝkotizo** ĝis 31.03.2005, ĝis 31.05. 2005 kaj pli poste ankaŭ surloke estos:

por esperantistoj de Latvio, Litovio, Estonio - respektive 10 eŭroj, 12 eŭroj, 15 eŭroj;

por esperantistoj el ekssocialismaj landoj – respektive 15 eŭroj, 20 eŭroj, 25 eŭroj;


por esperantistoj de aliaj landoj – respektive 20 eŭroj, 30 eŭroj, 40 eŭroj.

Infanoj ĝis 15 jaroj aliĝkotizon ne pagas. Lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas duonon.

**Loĝado** estos en studentaj komunloĝejoj kaj diversnivelaj hoteloj (la prezo de10 eŭroj diurne por unu persono. Pli detalaj informoj sekvos en la informilo n-ro 2.

**Aliĝilon** petu ĉe Organiza Komitato de BET-41, p.k. 150, LV-1050 Rigo, Latvio.

Retadreso: etulino@one.lv ,
tel.: (371) 7135250;
portebla tel. +371 6407174.



◄ Junuloj aktivas en la dancosalono. Venu tien por inspiri ilin aktivi ankaŭ por la E-movado.

## 15a INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO

Ĝi estas organizata kune kun BET-41 de la 14a ĝis la 22a de julio 2005. La organizantoj jam prezentis pli detalan programon:

14an de julio – alveno al Rigo, vojaĝo al Talino, tranokto.

15an de julio – konatiĝo kun estona ĉefurbo, reveno al Rigo, renkontiĝo kun partoprenantoj de BET-41; tranokto.

16an de julio – komuna inaŭguro de BET-41 kaj IEK-15. Vojaĝo al Jûrmala, partopreno en folklora urba festo. Reveno al Rigo; tranokto.

17an de julio – konatiĝo kun Rigo; tranokto.

18an de julio – ekskurso laŭ "bordo de livoj" (estonaj praloĝantoj ĉe Riga golfo); tranokto en Rigo.

19an de julio – partopreno en programoj de BET kaj IEK, ŝipekskurso laŭ rivero Daŭgava. Tranokto en Rigo.

20an de julio – ekskurso al Cesis kaj Sigulda, valo de rivero Gauja; tranokto en Rigo.

21an de julio – fermo de BET kaj IEK. Libera tempo. Tranokto en Rigo.

22an de julio – vojaĝo al Aglona baziliko, tra Daugavpils al Vilnius; partopreno en la 90a Universala Kongreso.

**Aliĝkotizo 5 eŭroj;** gvidantoj de la grupoj kaj de la ensembloj aliĝas senpage. Aliĝkotizo inkluzivas programon, Esperantan ĉiĉeronon, sed ne vizitadon de muzeoj, kasteloj nek transportadon.

**Loĝado:** tranokto en Talina studenta domo – 10 eŭroj; loĝado en Riga studenta domo en 2- kaj 3-litaj ĉambroj (kun necesejo kaj duŝejo) sen matenmanĝo – 8 eŭroj. Tranokto en komunloĝejo (necesejo kaj duŝejo suretaĝe) – 6 eŭroj. Tranokto en Rigaj hoteloj – 25 eŭroj kun matenmanĝo ( 8 noktoj, inkluzive Talinon – 200 eŭroj). Tagmanĝo kaj vespermanĝo – 3-6 eŭroj por manĝo.

Busaj ekskursoj por persono – 20 eŭroj.

Ensembloj aliĝas kun rabato de 50 eŭroj, se la grupo aliĝas ĝis 30.12.2004.

Adreso por kontaktoj:
*Mara Timermane,*
*Kr.Valdemara 145 / 1-32, LV-1013 Riga, Latvio.*
*Tel.: +371 9115413;*
*retadreso: mtimermane@yahoo.com*
*TTT-paĝo: www.aliaflanko.de/latvio/*

## Iom pli pri DISVASTIGO

*—Paroli pri Esperanto ne nome de Esperanto —*



Pri la gazetara agentejo DISVASTIGO estis kelkaj linioj en "Meandro 2". Nun vi povas pli detale konatiĝi kun la agentejo.

DISVASTIGO, jam prezentita dum la UK en Gotenburgo de s-ino Ackermann, kunlaborantino de la agentejo en Triesto, liveras novaĵojn, artikolojn kaj dokumentojn pri problemoj de internacia komunikado kaj pri projekto ESPERANTO al gazetaro kaj al specialaj kategorioj (lingvistoj, politikistoj, junularaj organizoj k.t.p.)

La ĉefaj trajtoj de la aliro al gazetaro, kiel deklaras la kreinto de la iniciato Giorgio Bronzetti, ĉeestanta en BET, estas profesieco ("Disvastigo" estas registrita ĉe tribunalo kaj agas inter italaj gazetaraj agentejoj) kaj daŭraj kontaktoj kun ĵurnalistoj. Tre fruktodona estis ĝis nun la informa agado de Disvastigo, precipe en regiono de Abruzzo, kie la agentejo kreiĝis. Centoj kaj centoj da artikoloj ĝis nun aperis pri Esperanta vivo, kiel "Malkovru la mondon per Esperanto", "Vizito de japana esperantisto" aŭ gravaj longaj artikoloj, kiel:

- Ne al lingvaj diskriminacioj favore al anglofonoj;
- Eŭropa Komunumo punas civitanojn ne anglalingvajn;
- Superregado angla-usona kaj altrudo de la angla;
- Ĉu ni estas certaj, ke la angla helpas Eŭropan Union;
- Naskiĝo de "Sardenglish".

Oni sukcesis dufoje publikigi ankaŭ en itala revuo artikolon kun aldono de kurso de Esperanto en KD en kvanto de 310000 eksempleroj.

La informoj dissenditaj de Disvastigo estas ankaŭ gazetaraj revuadoj pri lingva politiko, Eŭropa lingvoproblemo kaj lingvaj problemoj ĝenerale. La agentejo serĉas kunlaborantojn, kiuj sendu ĉiumonate resumojn de la artikoloj aperintaj pri tiu temaro en gazetaro de propra lando, precipe de novaj membroj de Eŭropa Unio, kies lingvoj ĝenerale ne estas tre konataj. Pere de serĉmotoroj gazetaraj (ekzemple la servo Alert de Google) la laboro estas ege facila. Eble oni povus aranĝi ankaŭ tradukojn de plenaj artikoloj por ĵurnalistoj, kiuj tion petus. Krome la kunlaborantoj, kiuj organiziĝus tiucele, povus liveri informojn ankaŭ al vialanda gazetaro kiel landa sekcio de la agentejo.

*Giorgio Bronzetti (gbronzetti@disvastigo.it)*
*Retpaĝo de la agentejo: www.disvastigo.it*

## KONTAKTOJ SERĈATAJ

La franca esperantisto Christian GARINO, kiu kondukis liston "Eŭropo Demokratio Esperanto" en sudorienta regiono de Francio dum Eŭroparlamentaj balotoj, serĉas esperantistojn de aliaj Eŭropaj landoj, kiuj dezirus kunlabori kun li por promocii Esperanton pere de Eŭropaj parlamentanoj.

Adreso por kontakti lin:
*Christian GARINO,*
*Esperanto-Maison des Associations,*
*FR-73000 CHAMBERY, Francio / France.*
*Retadreso: federlangues@yahoo.fr*

## ĈU VI DIVENIS LITOVAJN ENIGMOJN

publikigitajn en MEANDRO 4?

Jen la solvoj (laŭvice): Lango, Selo, Tablo, Libro, Frosto, Libro kaj literoj, Homo kiel bebo, plenkreskulo kaj maljunulo kun bastono, Du okuloj.




Ĉu vi volas aliĝi? Eblas tion do fari dum BET Turniĝu al la registrejo.

Ke nia informilo *MEANDRO* estu pli interesa, tio dependas ankaŭ de vi! Skribu viajn impresojn, proponojn, kritikojn, ankaŭ anoncojn pri viaj programeroj. Mallongajn artikoletojn transdonu al la redaktoroj aŭ restigu en registrejo.
Pli longajn artikolojn pri la aranĝo skribu por *LITOVA STELO*.


Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok